

8-a Afrika Kongreso de Esperanto



Kongresa libro



Kongresa libro de la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto

© Afrika Komisiono de UEA, 2022

<https://esperanto-afriko.org/>

Redaktado, enpaĝigo: Afrika Komisiono

Presita en Buĵumburo, Burundo. Eldonkvanto: 100 ekzempleroj

LIBRO DE LA 8-A AFRIKA KONGRESO DE **ESPERANTO**

KONGRESA TEMO:

‘Esperanto, ŝanco kaj ne minaco por Afriko’



Antaŭparolo

En 2013 okazis la 5-a Afrika Esperanto-Kongreso en Kotonuo, Benino, post multjara paŭzo. Tiam, la ekzistantaj organizoj: la Afrika Komisiono de UEA, la Asocio de Esperantistoj de Benino (ABeE) kaj Scio Sen Bariloj (SSB), decidis okazigi la Afrikan kongreson post tri jaroj, kaj tiu ĉi tradicio estis establita. La sekva kongreso okazis en 2016, en Bunda, Tanzanio, post tri jaroj, Burundo gastigis tiun prestiĝan tutkontinantan eventon en (2019), nun estas la vico de Senegalo, en la bela urbo Tieso.

La Afrika Esperanto-Kongreso estas grava evento, kiu havas plurajn celojn:

- Kunvenigi aktivulojn ĉirkaŭ unu tablo por diskuti pri la Esperanto-movado,
- Plifortigi la movadon en la organiza lando
- Pensi kune strategiojn por la tutkontinenta movado,
- Plifortigi la senton de kunlaborado inter partoprenantoj,
- Kunhavigi spertojn inter partoprenantoj por lerni unu de la alia.

Notu, ke la kursoj organizataj dum la Afrikaj Esperanto-Kongresoj multe helpas maturigi la partoprenantojn lingve kaj por la movado. Ni diras tion, ĉar post la 7-a Afrika Kongreso, kies prezentoj/prelegoj baziĝis sur kunlaboro inter afrikaj esperantistoj, multe kontribuis al tio, ĉar la Afrika Esperantumo de antaŭ 2019 estas tute malsama al tiu de post 2019, montriĝis longperspektivaj pozitivaj ŝanĝoj

Afrikanoj estis forte reprezentitaj en la konsilioj/komitatoj/diskutoj de diversaj internaciaj organizoj, Afriko montris sin pli kaj pli ekstere kaj ni tre esperas, ke tiu aliro daŭros ĝis nivelo kontentiga estos atingita.

Malgraŭ la financaj baroj alfrontataj de la afrika movado, pluraj aktivuloj el diversaj anguloj de la kontinento sukcesis ĉeesti tiun kongreson en 2019.

La elirinta afrika komisiono faris multe da laboro por la kongreso, kaj la nova komisiono transprenis la kongresajn taskojn.

La kongresa libro, kiun vi tenas en viaj manoj, celas doni superrigardon pri bazaj kaj utilaj informoj rilate la kongreson: La lando, ekskursoj, interesaj programeroj..., bonvolu ĉiam legi ĝin kaj elekti kio taŭgas por vi. Estas multegaj interesaj programeroj, kaj ni ankaŭ ŝatus ke parto de la programero estu virtuala.

Redaktoro

26-30 de decembro 2022
Tieso, Senegalo

Senegala Loka Kongresa Teamo



Lafi Charles DIATTA,
Kunordiganto &
Loĝigado



Assane Faye,
Kunordiganto &
Ekskurso



Ousmane Diol,
Loĝistikoj kaj
Transporto




Thierno Ba,
Loĝistikoj kaj
Transporto



Antoine Gomis,
Edukado kaj
Trejnadoj



Ismaila Ndione,
Edukado kaj Trejnadoj
Junerala sekcio



Penda Ndiaye,
Edukado kaj
Trejnadoj



Ndeye Amy Camara,
Nutrado



Sokhna Thiaba Faye,
Sano kaj Sporto
(Virina sekcio)



Arona Sanghare,
Sano kaj Sporto



Moussa Thiaw,
Nutrado



Babacar Faye,
Loĝigado

Assane Faye,
Ekskursoj



Ousmane Diol,
Ekskursoj

Membroj de la Afrika Komisiono de UEA 2022



Aime-Patrick Manirakiza,
Kunordiganto:

*Rilatoj kun afrikaj landaj asocioj, Rilatoj kun publikaj
instancoj kaj retpaĝo*
Burundo



Lydie ZAFINIFOTSY,

Vic Kunordiganto :
*Rilatoj kun junerala agado, reklamado
en sociaj retejo kaj sporto*
Madagaskaro



Koffitche KOUFIONOU,

Sekretario :
*Rilatoj kun informado, retradio kaj
kongresoj*
Togolando



Espoir NGOMA KASATI,

Vic-Sekretario :
*Rilatoj kun protokolado, Afrika
bulteno kaj retaj kursoj*
DR Congo



Miora Raveloharison,

Komisionanino :
Rilatoj kun virina agado kaj kulturoj
Madagaskaro



John Emmanuel Magessa

Komisionano:
*Rilatoj kun UK, Instruado, revigligo de
lokaj E-klubo kaj Turismo*
Tanzanio

26-30 de decembro
Tieso, Senegal

Senegalo, la lando



Senegalo (aŭ malofte *Senegalio* estas ŝtato en Okcidenta Afriko sude de la rivero Senegalo kiu formas la limon inter Senegalo kaj Maŭritanio. Krome, Senegalo limas kun Malio Oriente kaj kun Gvineo kaj kun Gvineo Bisaŭa sude, kaj kun Atlantiko Okcidente. Ene de Senegalo estas la ŝtato Gambio ĉe la rivero samnoma 300 kilometrojn longa. La insularo de Kabo-Verdo estas en la Atlantika Oceano ĉirkaŭ 560 kilometrojn enmaren kaj antaŭ Senegalo.

Senegalo estas en la centra pinto de Okcidenta Afriko, sub la arabaj landoj (Maŭritanio norde estas la lasta araba lando) kaj la landoj de la Golfo de Gvineo sude. La loĝantaro de Senegalo estas plejparte islama. La lando estis dum pli ol unu jarcento kolonio de Francio kaj pro tio ties influo estas konsiderinda. Kiel ĉe multaj afrikaj landoj, tiu ĉi enhavas loĝantaron el pluraj malsamaj etnoj, el kiuj la majoritataj grupo kaj lingvo estas la volofa kaj volofoj respektive.

Senegalo akiris sian sendependecon de Francio en 1960, kaj dum siaj jaroj da ekzistado tie regas stabila reĝimo. Malsimile al multaj afrikaj landoj, ne okazis militaj puĉoj, etnaj konfliktoj aŭ civilaj militoj. Senegalo estas hodiaŭ modelo de plurpartia demokratio en Afriko.

Geografio

Senegalo situas okcidente de Okcidenta Afriko. La senegala pejzaĝo konsistas ĉefe el undecaj sablecaj ebenaĵoj de okcidenta Sahelo kio leviĝas al montetoj sud-oriente. Tie troviĝas ankaŭ la plej alta kulmino en Senegalo, sennoma ejo ĉe Nepen Diakha de 584 metrojn alta. La norda limo estas formita de la rivero Senegalo, kaj aliaj riveroj inkludas la riverojn Gambio kaj Casamance. La ĉefurbo Dakaro kuŝas en la duoninsulo Cap-Vert (Verda Kabo), la plej okcidenta pinto de kontinenta Afriko.

La loka klimato estas tropika kun tre diferencaj seka kaj humida sezonoj, kiuj estas kaŭzo de nord-orientaj vintraj ventoj kaj sud-orientaj someraj ventoj. La jara pluvokvanto de Dakaro estas ĉirkaŭ 600 mm inter junio kaj oktobro kiam la maksimumaj temperaturoj averaĝas 27 °C; el decembro al februaro minimumaj temperaturoj estas ĉirkaŭ 17 °C. Internaj temperaturoj povas esti iom pli altaj ol ĉe la marbordo, kaj la pluvo pliiĝas sufiĉe pli sude, ĝis 1.5 m jare en kelkaj areoj. En la pleja interno de la lando, en la regiono de Tambacounda, ĉefe ĉe la limo kun Malio, temperaturoj povas atingi tiom alte kiom 54 °C.

La insularo de Kabo-Verdo situas je 560 km for de la Senegala marbordo, sed Cap Vert (tio estas Verda Kabo) estas s marborda loko, ĉe "Les Mamelles", klifo 105 metrojn alta ĉe la fino de la duoninsulo Cap Vert kie setlas senegala ĉefurbo Dakaro, kaj je 1 km sude de "Pointe des Almadies", la plej okcidenta pinto de kontinenta Afriko.

Demografio

Dum 2007, Senegalo havis loĝantaron de 12.520.000 homoj. La mezaveraĝa vivodaŭro estas de 56 jaroj. La mezaveraĝa filkvanto por unu virino estas de 5,1, unu el la plej altaj kvantoj de la mondo, kio kaŭzas malfacilan ekonomian kaj median problemaron. 40,2% de la popolo senegala estas alfabetigita, scias legi.

Tiu popolo kiu kreskas ege rapide, kun fekundeco pli alta de 5 gefiloj por ĉiu virino, troviĝas malegalece distribuita tra ties teritorio, kaj ĉefe en la atlantikaj regionoj. La regionoj plej urbigitaj estas Ziginĉor, **Tieso** kaj Saint-Louis kontraŭ la plej senhomaj nome Kolda, Matam kaj Fatik. Estas la regiono de Tambakounda, kiu posedas la plej malaltan densecon (11 loĝantoj por km²). Oni vidas ankaŭ tre grandan etnan diversecon: wolofoj (43,3%), peŭloj (23,8%), sereroj (14,7%), djoloj (3,7%), malinkoj (3,0%), soninkoj (1,1%) kaj kelkaj etnaj popoloj malpli nombraj kaj pli lokaj, sen kalkuli la 50.000 eŭropanoj (francoj ĉefe) kaj libananoj kiuj loĝas en urba medio.

La franca estas la oficiala lingvo, sed ĝi estas uzata ĉiutage nur de minoritato.

Bonvenon al Tieso



Tieso (volofe *Cees*, france *Thièse*) estas la kvina granda urbo de Senegalo kun loĝantaro de 237 849 (nombrado de 2002). Ĝi situas oriente de Dakaro ĉe la nacia strato N°2 kaj ĉe la fervoja nodo de la linio Niĝero-Dakaro (konstruita inter 1906 kaj 1923) kiu kondukas orienten al Dakaro, okcidente al Bamako kaj norde al Saint-Louis. Thiès estas konektita al la internacia aertransporta reto per la flughaveno Dakar-Blaise Diagne, troviĝanta je ĉ. 20 km de Tieso.

Tieso estas la ĉefurbo de la samnoma regiono Tieso.

La urbo tre estas fama pro sia tapiŝa industrio. Aparte pro tio oni establis en la jaro 1966 unu el la plej grandaj fabrikoj de la lando. Krome la urbo estas centro de la brutokomerco kaj viandoproduktado. Tieso disponas pri avenuoj kun arboj.

En la regiono oni plejparte produktas rizon, maniokon, arakidojn, milion kaj fruktojn. En la proksima Palo oni ekspluatas aluminio-fosfaton, grava eksportaĵo por la lando.

26-30 de decembro 2022

Historio

En 1863 fondita kiel fortikaĵo, la urbo loĝigas nuntempe i.a. politeknikan altlernejon, muzeon kaj unu el la plej malnovaj, ankoraŭ funkciaj kinejoj de Senegalio.

En 1937 kaj denove en 1947, okazis ripetaj strikoj de fervojistoj celantaj akiri sendependecon de Francio. Inter 1947 kaj 1948 ĉi tie senegalaj ĉefervojaj laboristoj ribelis kontraŭ rasismaj laborkondiĉoj.

Tieso aliĝis al la reto de la Internacia Asocio de franclingvaj urbestroj ('Association internationale des maires francophones - AMF).

Laŭ censo en 2013, Tieso havis 317 763 loĝantojn^[1], dum la regiono de Tieso laŭ censo en 2020 havis 2 162 800 loĝantojn^[1].

En kaj ĉirkaŭ Thieso loĝas la popolo *Serer-Noon*, kiu parolas la nonan lingvon ('Noon-lingvo'), canginan lingvon

Tostan, la centro kiu gastigas nin

Tostan (kun la signifo "sukceso" en la Wolof) estas usona registrita 501(c) internacia neregistara organizo kun ĉefsidejo en Dakaro, Senegalo. La misio de la organizo estas "kapabligi komunumojn evoluigi kaj realigi ilian vizion por la estonteco kaj inspiri grandskalajn movadojn kondukantaj al digno por ĉiuj" en pluraj okcidentafrikaj landoj, inkluzive de Senegalo, Gvineo, Gvineo Bisaŭa, Gambio, Malio, kaj Maŭritanio.

Tostan prenas holisman, integran aliron al evoluo faciligante homrajto-bazitajn, ne-formalajn edukprogramojn, plej precipe la Komunuman Kapabligan Programon (CEP) (CEP), kiu planas apogi kaj kapabligi partoprenantojn kaj komunumojn por gvidi sian propran evoluon. La organizo laborigas pli ol 500 homojn kaj laboras por kreskigi kaj antaŭenigi komunuman engaĝiĝon en projektoj rilatigantaj al legopovo, sano, higieno, infana bonfarto, homaj rajtoj kaj demokratio, media daŭripovo, kaj ekonomia kapablo.

Kvankam Tostan estas plej konata pro sia sukceso akceli la forlason de damaĝantaj tradiciaj praktikoj, precipe ina mutilado kaj infan-geedziĝo, en tuta Afriko, la organizo ankaŭ atingis pozitivajn rezultojn en la efiklokoj de administrado, edukado, sano, ekonomia kapablo, kaj la medio, same kiel en la intersekcaj aferoj de infan-protektado, kapablo de virinoj kaj knabinoj, kaj frua infana evoluo. En 2007, Tostan ricevis la premion Conrad N. Hilton Humanitarian Prize, la plej grandan humanitaran premion de la mondo, pro ĝiaj "signifaj kontribuoj al la mildigo de homa sufero."



de la Estrarano de UEA pri Afriko



Jeremie SABIYUMVA

Karaj partoprenantoj,

Saluton kaj bonan restadon en nia kongreso.

Ekde 2019, kiam ni finis nian kongreson en Burundo, nun ni denove renkontiĝas en Senegalo, la lando Sengor, la lando kiu enhavas multajn bonegajn aspektojn, ĉarma lando.

Jen ni estas en Tieso, en la centro Tostan, kie ni pasigos nian lastan semajnon de 2022 por eniri 2023 kun distraĵo kaj poste kun diskutoj pri la Esperanto-movado.

Kiel diris LL Zamenhof, homoj renkontas homojn. En la kongreso ni ĉiuj estas homoj, ni forgesas niajn devenlandojn kaj sentas nin kiel granda familio.

La estraro de UEA, kiun mi reprezentas, ĉiam observas kun granda atento la evoluon de la afrika movado. En la mandato 2019-2022, kiel estrarano de UEA por Afriko, nia prioritato estis revenigi senton de kunlaboro inter afrikanoj, ĉar kiel kelkaj el vi scias, la Esperanto-movado en Afriko estis viktimo de konflikto inter diversaj tendencoj de la Esperanto-movado mem, kaj tio daŭris dum pli ol 10 jaroj. Bedaŭrinde, afrikanoj estis dividitaj inter si, kaj forgesis tion, kio karakterizis niajn geavojn, kiuj vivis kune dum pluraj jaroj malgraŭ siaj diferencoj. Pluraj aktivuloj decidis forlasi la movadon, ĉar laŭ tio, kion ni sciis, Esperanto estas lingvo de paco, do lingvo de paco fariĝis lingvo de milito. Pro tio, nia prioritato estis fini tiujn dividojn, por ke ĉiuj, malgraŭ siaj ideoj, povu kunlabori, do niaj diferencoj estus nia forto. Estis malfacile en la komenco, sed iom post iom la homoj komprenis, ke necesas kunlabori, antaŭenigi la movadon kaj ĉesigi atakojn. En 2019, dum la Burunda kongreso, UEA implikis esperantistojn sen konsideri la tendencojn al kiuj ili apartenas kaj tio alportis fidon inter esperantistoj. Jes, estus malfacile restarigi fidon en mallonga tempo, sed estis volo de ĉiuj flankoj. Mi elkore dankas la membrojn de la Afrika Komisiono 2019-2022 pro la farita laboro.

Nun, ni iras al alia paŝo, rekonstruante la movadon per revivigo de landaj asocioj, kiuj nun dormas. En la pasinteco, estis multaj fortaj landaj asocioj kiuj nuntempe estas dormantaj aŭ tute mortaj. Estas kluboj, kiuj ne plu aŭskultas. Iuj landoj kiel Ebur-Bordo, Ganao, Niĝero, Niĝerio... ne plu havas digojn. Ni pensis, ke eblas normaligi tiujn landojn/kluboj. Tial estis starigita nova afrika komisiono, kiu konsistas el gejunuloj. Ni pensas, ke la nuna movado bezonas junulojn, kiuj facile adaptiĝos al nia mondo. Nun estas malfacile organizi ekzistantajn kursojn, do necesas vidi la realon kaj alfronti ĝin.

La nuna afrika komisiono havas la taskon verdigi la tutan kontinenton, eĉ en landoj kie Esperanto neniam estis. Mi ĝojas, ke la komisiono ekfunkcias, kaj havas ŝancon labori dum la tuta semajno, ĉar ĉiuj estas en ĉi tiu kongreso, do ili povos fizike kunveni. Kiel mi diris, ili estas junaj, plenaj de energio sed bezonas viajn konsilojn kaj kunlaboron.

Antaŭ tiu ĉi kongreso okazis preparaj kursoj por trejni niajn samideanojn, kaj pro tio, vi vidas inter ni senegalanojn, kiuj povas bone paroli kun vi, helpi vin. Dankon al organizantoj.

Tiu ĉi kongreso estas speciala, temas pri la 8-a afrika kongreso de Esperanto, sed samtempe temas pri speciala kongreso ĉar okazos grava trejnado, pri organizado de UK. Vi eble jam aŭdis, ke Tanzanio kandidatiĝis por organizi la unuan UK en Afriko. Sed, organizi UK-on estas unu afero, kaj partopreni en ĝi estas alia afero. UK estas granda evento, kaj multaj esperantistoj partoprenas en ĝi. Mia deziro estas, ke almenaŭ duono de la partoprenantoj estu afrikaj. Ĉu ni havos 500 bonajn esperantistojn? Ĉu nun estas 1000 esperantistoj sur la kontinento? Do, jen nia celo, dum la kongreso ni diskutos pri diversaj strategioj por atingi ĉi tiun nombron, en 2 jaroj. La afrika komisiono pretas kunlabori kun vi por konkretigi tiun ĉi ideon per la programo "ni semas".

Por fini, mi dankas ĉiujn, kiuj: aliĝis, subtenis, finance kontribuis al la kongreso, pagis aviadbiletojn de komitatoj, al instruistoj, kiuj gvidis preparajn kursojn, al tiuj, kiuj pagis flugbiletojn por instruistoj, kiuj gvidis preparajn kursojn, al vi ĉiuj, kiuj nun legas ĉi tiun libron.

Ĝuu la kongreson

Dankon

de la Prezidanto de ILEI

ILEI-salutmesaĝo al la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto

Por mi estas granda honoro salutmesaĝi al via 8-a Afrika Kongreso de Esperanto, kiu okazas en Tieso, belega urbo de Senegal.

La temo de via Kongreso, t.e. “Esperanto - ŝanco kaj ne minaco por Afriko”, estas aparte interesa kaj alloga por mi. Feliĉe nia lingvo Esperanto povas plej efike funkcii kiel la komuna lingvo inter ĉiuj diverslingvanoj ĉu en unu lando, ĉu en unu kontinento kaj ĉu en la tuta mondo. Ni scias, ke komunikado ene de sennombraj landoj, kie ekzistas pluraj aŭ multaj (oficialaj aŭ neoficialaj) lingvoj, renkontas grandegajn problemojn, kiuj eĉ pere de alta elspezado kaj multaj homforto kaj tempo ne venkeblas. La samo validas eĉ pli draste ankaŭ pri kontinentoj, ene de kiuj troviĝas multnombraj lingvoj, kiel Afriko.

Jes, sendube Esperanto estas bonega ŝanco kaj beno por Afriko, ebligante glatan kaj sendiskriminacian komunikadon ĉu ene de ĝiaj multlingvaj landoj, ĉu en la kontinento, ĉu inter Afriko kaj la tuta mondo. Iam mi pledis por io nomata kiel “Alianco de Ne-anglalingvaj Landoj” por kontraŭi la nunan hegemonion de la angla kaj promocii universalan aplikadon de Esperanto. Estas vere diskriminacie kaj maljuste, ke la angla, kiu estas lingvo de nur dekono de la homaro estas trudita al naŭ dekonoj de la neanglalingvaj loĝantoj de la tero! Certe Afriko estas unu el la plej taŭgaj luliloj por tia Alianco, same kiel ĝi estis la unua lulilo de la hom(ar)o! Mi elkore esperas, ke tio realiĝos, ĉefe kaj unue pere de viaj Kongresoj, kaj tiel la kontinento, kiu estis la naskiĝejo de la homaro, fariĝu ankaŭ la kultivejo de la justa komunikado, kio siavice estas premiso por justaj lingvo-ordo kaj edukado en la tuta mondo.

Kun elkoraj bondeziroj al via grandioza Kongreso,

Ahmad Mamduhi

ILEI-prezidanto

de la Prezidanto de TEJO

*Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO)*

Nome de la Estraro de TEJO, mi sincere gratulas kaj bondeziras al miaj samideanoj el la tuta Afriko okaze de la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE) en Senegalo.

Unuavice, mi vidas la AKE-n kiel trankviligan paŝon kiu klare signalas la renormaligon de interlandaj moviĝebloj kiujn severe malhelpis la kronvira pandemio tutmonda en la pasintaj kelkaj jaroj. Kompreneble, pli gravaj problemoj ol la pandemio hantas la kontinenton: financaj, sociaj, politikaj... pri kio mi profunde bedaŭras kaj solidaras al niaj afrikaj samideanoj kiel iu, kiu mem naskiĝis en disvolviĝanta lando ekster Eŭropo.

Antaŭ ol mi iĝis prezidanto de TEJO mi estis estrarano pri Landa kaj Faka Agado, kaj antaŭ tio, dum pluraj jaroj, forta voĉo kiu pledadis por la plitutmondigo de TEJO kaj plialirebligado de ĝiaj servoj kaj oportunoj al ekstereŭropaj esperantistoj. Mi ĉiam tenis en mia kapo la entuziasmon kaj sindonemon de afrikaj junuloj, kiuj amase lernas la lingvon, instruas ĝin al siaj komunumoj, kaj ĉiam strebas videbligi sin en diversaj sociaj retejoj. Mi samtempe vidis kiel floris aktivuloj ne nur el Senegalo, sed ankaŭ el Tanzanio, Demokratika Respubliko de Kongo, Burundo, Ruando, Togolando, ktp.

Sur la nivelo de landaj kaj regionaj junularaj movadoj ni vidas pozitivajn disvolviĝojn: antaŭ du jaroj estis akceptita la Junulara Esperantista de Tanzanio Organizo (JETO) kiel nova landa sekcio de TEJO, nuntempe pritraktas la aliĝon de Senegala Esperanto-Junularo (SEJ), vidis la reaktiviĝon de landa junulara organizo en Madagaskaro, kaj ricevis novaĵon pri la fondiĝo de la regiona organizo OAEJO. La klara mesaĝo de ĉio tio estas ke la sola direkto estas antaŭen al pli forta (re)organiziĝo.

Mi bedaŭras, ke loĝante nun en alia kontinento mi ne povas ĉeesti tiun ĉi novan historian momenton kun vi. Tamen, espereble pli da afrikaj esperantistoj sukcesos ĉeesti la 79-an Internacian Junularan Kongreson (IJK) en Italio venontjare, kiun ni vere intencas fari kiel la unuan veran tutmondan, pli alireblan, postpandemian IJK. Ni ankaŭ restas malfermitaj al la eblo, ke iam ni trovos nin mem en la vojo al la okazigo de la dua afrika IJK.

Karaj afrikaj samideanoj, lasu al mi memorigi al vi, ke vi ne estas forgesitaj—neniam. La prezidanto, la Estraro, kaj la komisionoj kaj interesgrupoj de TEJO estas je via dispono por helpi disvolvi vian agadon. TEJO subtenas landan agadon en Afriko. TEJO subtenas edukon, sciencan, kaj kulturan agadon en Afriko. TEJO estas via partnero en agado.

Kongresanoj, mi lasas al vi defion: dum la forumoj, ĉe la koridoroj, kaj eĉ post la kongreso, kreeme diskutu la estontecon de la junularo en Afriko. Kune nasku strategiojn kaj lanĉu projektojn. Mi kun granda anticipeco atendas viajn rakontojn kaj proponojn.

Havu belan kongreson kaj ĝuu Senegalon.

*Sincere,
Albert Stalin Tancinco Garrido*

de la Kunordiganto de Afrika Komisiono

Aime-Patrick Manirakiza



Karaj samkontinentanoj,

Karaj samkontinentanoj,

Karaj Esperantistoj,

Mi havas grandan ĝojon anonci al vi, ke la Afrika Komisiono de UEA havas novan konsiston. Ni petas de vi sinceran kunlaboron por atingi grandan rezulton.

Inter prioritatoj, kiuj estas sur la tablo, estas interalie: Kunordigo kaj organizado de la 8-a kongreso de Esperanto en Senegalo, la starigo de la platformo, kiu helpas instruistojn rete gvidi kursojn de Esperanto, varbi afrikajn esperantistojn por forte labori, kaj helpi unu la alian.

Ni fieras pri la unuaj elpaŝoj atingitaj de la membroj de la komisiono kie ni provis kolekti kontaktojn de Esperantistoj en diversaj landoj sed ni vidis, ke ni ne povas sukcesi sen via kunlaboro kaj kontribuo. La slogano de la nuna burunda Prezidento estas "kune ni povas" kaj mi pruntprenas ĉi sloganon por informi al vi ke ni kune sukcesos fari pli.

Afrika Komisiono ne povas atingi bonajn rezultojn sen vi. Kiel la grupo, kiun ni anstataŭis, kiu faris grandan laboron, nia ĉefa misio estas kunigi fortojn de ĉiuj Esperantistoj kaj ilin orienti pozitive por finfine konstrui daŭran afrikan esperantan familion. Ni ŝatas socion, kiu ne estas konstruita ĉirkaŭ kelkaj personoj, kvazaŭ aliaj Esperantistoj ne ekzistas aŭ dependas de eta grupo, kio frustrigadis aliajn. Niaj diferencoj estu nia forto, kaj en granda respekto okazu nia kunlaboro.

Vivu Universala Esperanto Asocio

Vivu la Afrika Komisiono de UEA

de Prof d-ro Renato Corsetti
Eks-prezidanto de UEA



Saluto al la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto

Estus facile nun ŝerci pri tio, ke neniŭ el ni homoj rajtas diri sin neafrikano, ĉar la homaro originis tie kaj de Afriko disvastiĝis al la tuta mondo. Sed eble tio ne estus oportuna, ĉar ĉi tiuj eks-afrikanoj sukcesis mistrakti sian devenlokon tiel multe, ke la efikoj ankoraŭ vidiĝas nun. Bonŝance nun la konscio, ke oni ne devas mistrakti sian patrinan kontinenton tre malrapide, ho kiel malrapide!, progresas almenaŭ en parto de la homaro. La esperantistoj certe estas konsciaj pri tio, ke ĉiuj homoj, ĉiuj popoloj, ĉiuj kulturoj estas samvaloraj kaj ke la mondo ne bezonas militojn, ekzemple por akapari al si la subterajn riĉaĵojn de Kongo, sed ke ĝi bezonas justan pacon.

Kiam temas pri la movado por Esperanto, Afriko ne ĉesas surprizi eŭropanojn per sia juneco kaj per sia lernofervoro. Tio, kio mankas en la afrika Esperantujo estas la organiziteco de la movado en lokaj stabilaj grupoj kaj en helpodonaj landaj asocioj. Evidente neniŭ kulpas pri tio. Simple la kondiĉoj ankoraŭ ne estas maturaj kaj la rimedoj, kiuj ebligas tion ankoraŭ ne estas je dispono, sed mi mem vidas signojn de progreso ĉie. Ĉi tiu kongreso mem, la 8-a, atestas pri tio. Espereble baldaŭ komenciĝos en la afrika kulturo ĝenerale kaj aparte inter la esperantistoj la revalorigo de la afrikaj lingvoj kaj de la kulturoj, kiujn ili portas. Tio estus granda idea helpo al Esperanto, ĉar Esperanto estis kreita ĝuste por ke ĉiu havu la eblecon esti si mem ĉe si kaj komuniki siajn valorojn al la aliaj.

En ĉi tiu spirito mi instigas vin debati pri la tri grandaj kolonoj de la vivo kaj agado de esperantistoj: informado, instruado kaj utiligado de Esperanto kaj proponi al la aliaj afrikaj esperantistoj manierojn, laŭ kiuj tio estas ebla en Afriko.

Tieso, Senegalo

Se vi sukcesos pri tio, ĉi tiu kongreso ne estos senutila. Mi, kiel helpanto de afrikaj esperantistoj, atendas multon de ĝi.

Sukceson!

Renato Corsetti



Karaj gekongresanoj, Mi tre ĝojas esti inter vi en Tieso. Mi denove partoprenas la AKE n - on. Denove mi estas en la Afrika Komisiono, denove mi vidas vin, karaj geamikoj, Mi ĝojas prelegi por trakti la temon de nia kongreso. Mi deziras ankaŭ ĝojigi la partoprenantojn per distraj ludoj dum kongreso kaj dum la ekskurso. Estas ja plezurige kunsidi kun virinoj kaj kundividi miajn etajn spertojn pri la infan - kaj virin - edukado . Mi ne mistrafas pensi pri niaj gefratoj suferantaj pro milito en Kongo kaj preĝi por ili. Grandan sukceson mi bondeziras al nia 8a AKE plena de amo kaj pace.

Miora-Raveloharison

Komisionanino : Rilatoj kun virina agado kaj kulturoj

Madagaskaro



Saluton al ĉiuj

Estas granda plezuro por mi partopreni ĉi tiun 8a Esperanto-kongreson. Por mi estas la unua fojo kaj mi ĝojas esti kun vi geesperantistoj. Ni ankoraŭ havas multajn laborojn por disvasti Esperanton en la tuta Afriko, precipe tie, kie Esperanto restas nekonata. Tiu kongreso certe helpos al ni atingi niajn celojn. Ni esperu ke ĝi donos bonajn fruktojn. Vivu la Esperanto!

26-30 de decembro 2022

Tieso, Senegal

Ranja Lydie
El Madagaskaro
Vic-kunordiganto de la AK

Espoir Ngoma Kasati

Vic-Sekretario:

Rilatoj kun protokolado, Afrika bulteno kaj retaj kursoj:

Saluton,

Mi nomiĝas Espoir Ngoma Kasati el Kongo-kinŝasa. Mi esperantiĝis en 2016.

Ek de 2017 ĝis nun mi estas esperantista instruisto, mi okazigas retajn kursojn kaj ĉeestajn en Lubumbaŝo, sude de nia lando. Mi volas kundividi mian sperton pri la vivoj de niaj esperanto-klubo, kiel ni povas organizi ilin kaj doni privilegion al Esperanto por ĝia longdaŭra disvastiĝo en iu certa loko.

Ĉar niaj Esperantaj kluboj ne longe vivas pro misorganizado, mi proponas, ke ni esploru kune la strategiojn subajn:

Niaj kluboj nepre devas esti laŭleĝaj kaj bone organizitaj, tio signifas ke la kluboj devas akiri juran personecon. Por tion efektivigi kelkaj aferoj estas havendaj, interalie:

- Statuto
- Laŭleĝigo de la statuto
- Lokalo.
- Kursoj estu pagataj- diplomo
- Instr- kaj lern-materialoj

John MAGESA

Komisionano:

*Rilatoj kun UK, Instruado, revigligo de lokaj E-klubo kaj Turismo:
Tanzanio*



Saluton,

Mia koro batas trankvile partoprenante en la 8a Afrika Kongreso de Esperanto en la lando de Sedar Senghor kiu havis Saman senton kiel Mwalim Julius Kambarage Nyerere (Tanzanio), Patrick Lumumba (DR-Kongo), Jomo Kenyata (Kenjo), Thomas Izidory Sankala (Burkina Faso) kaj Nkwame Nkuruma (Ghanao). Mi vere sentas hejme.

Kiel diris tiuj gravuloj ke Afriko devas unuiĝi, jen per Esperanto tio okazas. Malkaŝedirite nun estas la ĝusta tempo por farigi Afrikon grata per kaj por Esperanto. Do ni ĉiuj unuiĝu laŭ la Suahila diraĵo unuiĝo estas forto "umoja ni nguvu" por fortigi niajn movadojn esperantajn.

Post unu jaro espereble okazos unuan UK-n en Afriko- Tanzanio, do ni sen lace laboru por sukcesigi la okazigon de tia granda evento en la historio de Esperanto en Afriko. Paco estu kun vi ĉiuj dankon.



de **Gilbert NDIHOKUBWAYO**

Prezidanto de BIS/ILEI Sekcio en Burundo

Karaj samideanoj geesperantistoj, saluton !

Estas granda plezuro al mi aliĝi al ĉiuj el vi en la 8a Afrika Kongreso de Esperanto en Tieso, Senegalo. Mi estas Gilbert Ndihekubwayo el Burundo.

Fakte, la Afrika Kongreso de Esperanto estas tre bona okazo por geesperantistoj renkonti unu la aliajn en amikaj kaj pacaj momentoj. Tiam ni povas lerni de unu al la aliaj, interŝanĝi fratece, kaj kune kanti la "Espero" himnon kaj ĝui ke en la mondon venis nova sento.

Estus plezure se ĉiuj geesperantistoj povus fizike partopreni la gravan eventon AKE, sed tio ne eblas pro diversaj cirkonstancoj. Sed verŝajne gravas ke multaj komunumoj de Esperanto estas reprezentitaj en la AKE. Ĉiamaniere ni restas kune per la devizo de la sama ideo.

En Afriko, Esperanto povis kunigi diversajn kaj multajn homojn el disaj partoj de landoj. Nia tasko estas grava, ni devas labori por la amikeco, por la paco en la mondo. Instruistoj de Esperanto estas kolonoj por atingi la rezultojn de nia laboro. Kuraĝon al la instruistoj, kuraĝon ankaŭ al la lernantoj.

En la nuna mondo de la teknologia revolucio, ni esperantistoj devas lerni la novajn informajn kaj komunikajn teknologiojn, faciligajn rimedojn por la komunikado, al la malferma edukado, por la kundivido de la scio, kie ĉiuj homoj estas vokitaj al la partopreno al la sumo de la scio.

Vivu esperanto, vivu la paco en la mondo.

Gilbert-Ndihekubwayo.

Burundo



Karaj gesamideanoj,

*Kunlaborante, kunlaborante trans kulturoj kaj lingvoj vi sukcesos
KUNE.*

*Esperinde vi trovos la taŭgajn, pageblajn metodojn por plene ekuzi
la, novajn eblojn komuniki internacie.*

Kaj en via granda kontinento kaj en la mondo.

Certe mi pretas laŭ miaj ebloj asisti pri tio de fore.

Por nun, mi deziras al vi ĉiuj Fruktonon Konferencon.

Vivu Universala Esperanta Asocio

Vivu la Afrika Komisiono de UEA.

Vivu Senegala Esperanto-Asocio.

Piet COPPENS

Nederlando kunlaboreme en Esperantujo : Piet Coppens

26-30 de decembro 2022

Tieso, Senegalo

Al la Oka afrika kongreso!

*Varmajn salutojn de vintre malvarma Gotenburgo, Svedio! Ni
deziras al vi bonan kongreson, kiu donos al la mondon novajn
ideojn pri la evoluo de Esperanto kaj al pli paca estonteco!*

La Esperanto-Societo de Gotenburgo

Siv Burell

El la gotenburga e-societo



Alessandra Madella



Mi multe gratulas la afrikajn samideanojn por la okazigo de 8-a Afrika Kongreso de Esperanto. Mi ĝojas, ke ĝi jam estas tre signifoplena ankaŭ de la vidpunkto de instruado kaj lernado, ĉar senglaj samideanoj jam dum kelkaj monatoj serioze sin pretigis por ĝi ankaŭ tiufanke. Sukceson al vi kaj bonvolu daŭrigi la bonan laboron!

Elkorajn Salutojn el Italio.

Angel Marquillos Lopez

